EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler


**ENHAVO n-ro 25>** ● EKO jubileas ● Landa Parad'. ● Turismo ● Scienco **< apr. 28**

## EKO atingas jam sian jubileon



Rekorde frue ni atingas la jubileon. Tio okazis pro la senĉesa alfluado de komunikindaj novaĵoj en la loka, landa kaj regiona agado. La komunikoj atingis la 25an numeron en la 30a de junio 2021, en la 10a de majo en 2020, en 2019, antaŭ la pandemio, ni eĉ ne atingis 25 entute. EKO ege dankas al niaj provlegantoj kaj helpantoj, kaj al niaj partneroj UEA, ILEI kaj IFEF.

## Landa Parad': progresas la aktualigo por 2022

La komisiito pri Landa Agado prizorgas tiun unikan tutmondan servon por arigi kaj prezenti la bazajn informojn pri ĉiu Landa Asocio de UEA, kune kun aktualaj informoj pri la lando mem, necesaj por ajna homo kiu volas progresigi Esperanton en la koncerna areo. Ĝi traktas eĉ landojn sen akceptita Landa Asocio sed kie troveblas iom da esperantistoj kaj streboj al organiziĝo. La tuto plie valorigita per fotoj de Esperantaj eventoj aŭ oficejoj kaj mapoj. La tri jam pretaj mondpartoj estas Eŭropo (nepre la plej malfacila), Pacifiko (Usono, Kanado, Meksiko, Aŭstralio kaj Nov-Zelando) kaj MONA (Mez-Oriento kaj Nord-Afriko).

## Turismo prizorgata de IKEF

En aprilo okazis la 60a Dimanĉa Kunveno (DK) de IKEF kun pli ol 40 partoprenantoj. La temoj: 1) Pri projekto *IKEF-Turismo*; 2) Pri aktualaj laboroj de IKEF.

Nun IKEF starigas la projekton *"IKEF-Turismo"*. La sekretariejo de IKEF prilaboras la turisman projekton kaj kadre de la projekto IKEF planas organizi ekskursojn al Turkio, Tajlando, Vjetnamio kaj Arabaj Emirlandoj. La programoj (itineroj) de la ekskursoj jam estas prilaboritaj kaj ĝuste nun la sekretariejo prilaboras kun koncernaj turismaj agentejoj pri vojaĝ-prezoj. IKEF anoncos la ekskursojn al la publiko post definitivigo de la detaloj.

Pri aktualaj laboroj de IKEF, la partoprenantoj starigis komentojn, proponojn kaj demandojn pri distanca kurso pri internacia komerco, la regula bulteno de IKEF *"La Merkato"* kaj plibonigo de la retejo de IKEF. Ni invitas ĉiujn kunlabori sur tiuj kampoj.

IKEF-Estraro

Ni observas refoje kazon, ke nova projekto malkovras agadon pri kiu neniu sciis! Esperantisto el Taĝikio anoncas proponojn por vojaĝoj al Turkio. La koncerna homo membras en vojaĝagentejo. Mi donos pliajn kontaktinformojn al petantoj.

Kiom da kapablaj esperantistoj kuŝas inter niaj fakaj asocioj, malkonataj al UEA kaj ILEI? En Taĝikio, UEA havas nur unu membron, kiu ne estas tiu turisma aganto.

Evidente, turismo estas fekunda kampo, kiun IKEF povos inde kreskigi.

Fino de prediko SMG

# Ponto ne nur metafora sed fizika

Ni invitas vin al la tradicia „Ponta Festo“ de la urbo Frankfurt (Odro), Germanio, 100 km oriente de Berlino, la 1-an de majo 2022 post dujara deviga paŭzo. Denove mi instalos informstandon pri Esperanto nome de Esperanto-Ligo Berlin-Brandenburgio. Ĉi-jare per apogo de la Popola Altlernejo de Frankfurt (Odro), ĉar tie okazos informvespero pri Esperanto la 5-an de majo. La Ponta Festo okazos inter 11:00 kaj 18:00 ĉefe en la regiono de la urboponto inter Frankfurt (Odro) kaj Słubice. En la proksimeco de la ponto (en norda direkto) ankaŭ instaliĝos nia informstando, rekonebla per Esperanto-flago.

Nia informstando memkompreneble bonege kaj konvinke denove demonstru, ke Esperanto ne nur funkcias, sed estas bona interkomprenilo inter la popoloj, do ankaŭ ponta lingvo. Pro tio ankaŭ estus bonega afero, ke mi ne restos la unusola esp-isto dum la festo.

Bedaŭrinde mi mem eble ne havos multe da tempo por akompani vin dum via restado en la urbo ĉar mi, kiel kutime, devos resti ĉe la stando. Tamen multe okazos dum tiu ĉi tago ambaŭflanke de la Odro-rivero kaj vi certe ne enuos. Vespere ni renkontiĝos en agrabla restoracio por komuna babilado. Do, bv. veni pro nia komuna celo – la uzado de Esperanto kiel ponta lingvo dum ponta festo! Pro ebla tranoktado ĉirkaŭ la 1-a de majo en Frankfurto ĉe Odro bv. turni vin al mi e-poŝte. Se vi hazarde estas en nia regiono, bv. veni, aliokaze sendu bildkarton kun eta saluto al mia adreso!!

https://esperanto.berlin
Esperanto-Ligo Berlin-Brandenburgio/, p/a Ronald Schindler,
Eberswalder Straße 15, D-15234 Frankfurt (Oder); e-poŝto: RonaldSchindler@web.de

## Nova kurso en la urbo de la ILEI-kongreso en 2017

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto kurso en KTC Busan dumviva edukejo
Gvidantonomo: Inhye Gim (Ella)
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Busan, Korea Respubliko
Aldoninto: kih4860

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27416

# Scienco en TEJO - maŝinlernado

Ĉu maŝinoj povas lerni mem pensi? Kie troviĝas artefarita inteligenteco? La komisiono de TEJO pri #Scienco invitas vin al la prelego de Jacob Nordfalk pri Maŝinlernado, la 30-an de aprilo ekde la 15:00 UTC. https://meet.google.com/muy-qbvu-yfy




Oni ne bezonas apartajn konojn por ĉeesti la prelegon, krom povi vidi, ke kalkultabelo havas vicojn kaj kolumnojn.Post la prelego, vortoj kiel loĝistika regreso, kaj subtenaj vektoraj maŝinoj, hazardaj arbaroj kaj neŭralaj retoj ne plu estos fremdaj al vi, kaj vi komprenos kiel Tesla povas fari memveturajn aŭtojn. Kaj pri la artefarita inteligenteco de maŝinoj, vi verŝajne pensos: ”Nu, ĉu estas simple tio?”

Szilvási László; F*onto: Virtuális Eszperantó Klub*

## Interlingvistoj – jen via vespermanĝo

Nun haveblas numero 119 de IpI (Informilo por Interlingvistoj) kaj numero 19 de IfI (Information for Interlinguists)

En Esperanto: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2022/04/ipi-119.pdf

Anglalingve: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2022/04/ifi-119.pdf

IpI kaj IfI estas eldonitaj de Esperantic Studies Foundation (ESF) kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ili disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por universitatanoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj temoj.

Artikoloj en IpI kaj IfI ĝenerale nun aperas pli frue en la blogo ESF Connected. Ĉiu numero kolektas artikolojn kaj novaĵojn el la antaŭaj tri monatoj de tiu blogo.
Antaŭaj numeroj: https://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/
https://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Simon Davies, redaktoro; <ipi<ĉe>esperantic.org>

## La Israela Kongreso kun AMO 85

Finiĝis la naŭ-taga programo de la 22-a Israela Kongreso kune kun ĝia postkongresa ekskurso. En la kongreso partoprenis fizike ĉ 20 personoj, el ili 7 eksterlandanoj, kaj virtuale ĉ. dek. Matene okazis ekskursoj, posttagmeze prelegoj kaj vespere artaj programoj. Pluraj programeroj videblas  en la jutuba kanalo de ELI (ligilo sube).

Ĵaŭde virtuale prezentis la unuan programeron Mikaelo Bronŝtejn kaj Dina Rubina (unu el la plej renomaj israelaj verkistoj en la rusa lingvo) - pri ŝia libro "La blanka kolombo de Kordovo", kiu aperis ankaŭ en E-o (tradukis Mikaelo, aĉeteblas ĉe ELI kun aŭtografoj de la verkisto kaj tradukisto). Sekvis laborgrupo pri eŭritmio de Tali Wandel, kiu en la vespera programo prezentis kun kolegino eŭritmian dancon. Sekve kantis Inbar kaj Enrica kaj poste okazis koncertoj de Sergeo Straŝnenko kaj de Georgo Handzlik.

Vendrede salutis virtuale Duncan Charters, prezidanto de UEA, Mikaelo Bronŝtejn prelegis virtuale pri judaj bardoj en la Dua Mondmilito kaj okazis la 85-a AMO-seminario pri scienca agado - kun 3 prelegoj pri ISAE (Stefan MacGill, virtuale), spacteleskopoj (Amri) kaj la Internacia Kongresa Universitato kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (Amri, sabate). Vespere okazis koncerto de ukrainaj kantoj far Mikaelo Lineckij kaj Sergeo Straŝnenko. kaj premiero de la nova kabaredo "Verda Banano" de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik.

Artikolo pri la kongreso kaj postkongreso (verkis Georgo Handzlik) aperos en la maja n-ro de la revuo *Esperanto*.

Amri

## Madagaskaro refoje elsendas

La ELSENDO N°119 de Aminda Radio Esperanto proponas al siaj geaŭskultantoj diversajn rubrikojn pri Malagasio. Estas interese plu scii pri la arbaro Kirindy en la suda regiono de la lando. Nia podkasto enhavas ankaŭ etan lecionon pri la malagasa lingvo. Kaj la redaktoro instigas vin diskuti pri universitato en kaj pri Esperanto. Aliflanke, por ilustri nian elsendon, ni elektis kanton de *La Porkoj* pri milito, grava temo en la nuna situacio en Ukrainio. Agrablan aŭskultadon.

https://youtu.be/keAuO_lYlFg

## Varia enhavo de la marta Ondo

Aperis la marta eldono de "La Ondo de Esperanto" (2022, №311) — vivo esperantista, Esperantaj deklaroj pri la situacio en Ukrainio, niaj jubileoj en aprilo, 50-jariĝo de la legenda PSEK, kvin rakontoj de Ivan Bunin en Esperanto, Esperanta libroproduktado en 2021, poezia kvodlibeto de Miguel Fernández, originalaj noveloj de Ĵenja Amis kaj Paulo Sérgio Viana, recenzoj, muzikaj novaĵoj kaj alia materialo sur 126 paĝoj. Konatiĝu kun la marta Ondo kaj pripensu vian (re)abonon: nur 15 eŭrojn….




========= vortoj: 1320 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.